Walter Klag

Alfred Heiligenbrunner

# SAT.IROJ




Sepa kajero

Unua eldono Vieno 2019
Eldonejo kaj presejo Klag
ISBN 978 3 903247 27 7
Kodo
Satiroj7-A1

La aprokakaniajn desegnojn faris
Wilhelm Busch
[vilhelmo buŝo]

La titolbildo montras
birdon en Roterdamo
kiu ne partumis
la 93-an Universalan Kongreson en Roterdamo.
Se vi scias ties specian nomon
bonvolu informi la eldonejon:
Rudolfinergasse 8/11, 1190 Wien, Aŭstrio
esperanto@chello.at

Por Sat.iroj 8 ni urĝe serĉas kontribuantojn.
Bonvole skribu al la eldonejo.

# HAVO ENA

## PARTO UNUA
## ALBUMO FINVENKA

## PARTO DUA
## LUDOJ VORTAJ

## PARTO TRIA
## INVITO AL MALMENSO

## PARTO KVARA
## LA SISTEMO KLERIGA EN APRIO-KAKANIO

Komence ŝercon:

Paciento: Kiom ofte vi jam faris tiun operacion?
Kirurgo: Pli ol 200 fojojn.
Paciento: Tio min trankviligas.
Kirurgo: Jes, certe vi povas trankviliĝi.
Iam ajn la operacio ja devas sukcesi.

A. H.

# PARTO UNUA
# ALBUMO FINVENKA




KATO
PRECISION RAILROAD MODELS

Malbona Living Regalkorb 32x32x34
passend für Kallax und Expedit Wasserhyazinthe







Poste la inteligenta hundo lernis volapukon.

BONEGA®

BTG

BATEGU

Simple bati ne sufiĉas

Rabobank

Via mono en bonaj manoj

HEJMO
Accommodation
& more...

MEBLO-MAX
Leszek Górski
CENTRUM HANDLOWE
ul. Chopina 6a
22-650 Łaszczów
tel. 0 506 075 892
Najtańsze Meble w Mieście




TRADITIONEEL ★ AMBACHTELIJK
Bongusta!
PASSIE ★ LIEFDE
ALTIJD LEKKER EN VERS

Bundesministerium
für Arbeit und Soziales

EHAP
Europäischer Hilfsfonds für die
am stärksten benachteiligten Personen

Europäische
Union

Brücke zur Integration

BONVENA

bonvena ido
Willkommen Kind
Bücher für Flüchtlingskinder in Kirchhellen

Dieses Buch gehört: ______________________________

*KOLPINGSFAMILIE KIRCHHELLEN*

BONVENA
École & Coworking


# PARTO DUA
# LUDOJ VORTAJ





BUL.TENO

Ĝas aŭ neĝas!



# PARTO TRIA
# INVITO AL MALMENSO

# MALMENSO

estas internacia asocio por tre malinteligentaj homoj.
Se vi malsukcesas en la sekva testo, vi rajtas membriĝi.

1) Kiom da anguloj havas triangulo?
A) 2
B) 4
C) 7
D) Mi konas nur unu, du, multe, sekso

2) Se unu homo havas unu kapon, kiom da kapoj havas du homoj?
A) Homo ne havas kapon
B) 4
C) Kio estas kapo?
D) Zamenhof naskiĝis en Pollando

3) Tri globoj estas verdaj. Kiun koloron havas la aliaj?
A) Ankaŭ verda
B) Eble ruĝa
C) Malhelbunteta
D) Globoj ne ekzistas

4) Desegnu kvadraton kaj unu diagonalon. Kiom da sesanguloj vi vidas?
A) Kiu dio?
B) Mi forgesis miajn okulvitrojn
C) Ĉu vi redonas al mi mian krajonon?
D) Mi transiras al demando 5 por ŝpari tempon

5) Lundo, mardo, merkredo, X. Kio estas Y?
A) Dek tagoj
B) Mia 100a naskiĝdatreveno
C) Ĉu vi redonas al mi mian kalendaron?
D) Kial rompiĝis mia globkrajono?

6) Kiom da literoj havas la vorto „Esperanto“?
A) Pli ol 33
B) „Esperanto” ne estas vorto
C) Vorto ne konsistas el literoj
D) Mi ne parolas la Klingonan lingvon

7) Sur kiu kontinento troviĝas Berlino, la ĉefurbo de Germanio?
A) En Sudameriko
B) Sur la luno
C) En la suno
D) Kontinentoj ne ekzistas

8) Kial rompiĝis via globkrajono?
A) Kio estas „globo”?
B) Mia najbaro daŭre batetas min
C) Mi rompos la globkrajonon de mia najbaro
D) Tiu testo estas tro komplika

9) Se unu kato dormas tri horojn, kiel longe dormas tri bovinoj?
A) Du minutojn
B) Tiel longe kiel dek hundoj
C) Jes, mi rebatos!
D) Soifon!

10) Kial vi vokis la policon?
A) Ĉar mia najbaro insultas min
B) Ĉar mia najbaro rompis mian globkrajonon
C) Ĉar mi volas ŝakludi
D) Formetu la revolveron!!!

# PARTO KVARA
# LA SISTEMO KLERIGA EN APRIO-KAKANIO



Aprio-Kakanio estas eta lando en eta kontinento. Tie vivas du etnoj:
La kakanoj kaj la aproj. Ili havas komunan, sed malfacile ellerneblan aprokakanan lingvon.

La lando estas ne tre konata en la mondo, sed ja ties kleriga sistemo, kiu estas la plej bona en la universo. Tio estas la merito de la jam 60 jarojn reganta Socialnaciema Partio, sed ankaŭ de la eminenta kleriga ministro, ties saĝaj ministeriaj oficistoj kaj de la inteligentaj lernejaj direktoroj, kiuj estas senescepte ĝismedolaj membroj de la Socialnaciema Partio.

Kelkaj ekzemploj ilustru la elstarecon de la noviga, reformema aprokakania instrua sistemo.

✳ La nedevige vizitebla lerneja fako „korusa kantado“ estis tre ŝatata. Por pligrandigi ties popularecon oni ŝanĝis la nomon al „koruso“. Tio estis la ideo de la partiestro de la Socialnaciema Partio, kiu ricevis grandan laŭdon de la ŝtata prezidento kaj grandan ordenon.

✳ La inaj kaj viraj instruistoj preskaŭ ĉiutage ricevas kelkajn oficialajn dekretojn de la kleriga ministerio. Ĉar la nombro de la dekretoj estis tro

granda, oni decidis jene: La malgravaj dekretoj estu presitaj sur blanka papero, la gravaj sur ruĝa. Bedaŭrinde la geinstruistoj ne legis la ruĝajn dekretojn. Tial la ministro instalis konsilantan komitaton, kies membroj estas po tri instruistoj el ĉiu lernejo. Okaze de la 250a kunsido de tiu komitato organiziĝis pompa solenaĵo. Pro la diligenta, celkonscia laboro de la komitato la partiestro ricevis laŭdon de la ŝtata prezidento kaj grandan oran ordenon. Ĉiuj komitatanoj ricevis arĝentan ordenon.

✳ La gelernantoj ricevas ankaŭ notojn por konduto kaj disciplino:
Tre bona (1), bona (2), malbona (3), terura (4).
Se instruisto volas doni la noton 3 aŭ 4, li aŭ ŝi devas verki longan raporton pri la konduto de la fibubo aŭ fiknabino, aldoni fotojn, videojn, sonregistraĵojn kaj tiel plu. Ofte tio ne estas ebla. Tial la geinstruistoj reforme faciligis la notan skalon: Tre bona (1), bona, malbona aŭ terura (2).

Ĉiuj gelernantoj kaj ties gepatroj ĝojegis pri la pli bonaj notoj!

Pro tiuj grandaj sukcesoj ĉiu instruisto ricevis la titolon „Kleriga Konsilanto”, ĉiu lerneja direktoro la titolon „Registara Ĉefkonsilanto” kaj la ministro por klerigado la „Grandan Ordenon kun la Ora Ŝafofelo kaj Oraj Kverkofolioj”.

Ĉu vi pensas, ke tiu historieto estas pura fantazio? [Verkita en Aŭstrio].

WK




Stulte rigardi povas ĉiu


Ŝercojn?
Ne!
Ĝis!